



El liberecana vidpunkto

3

2008/11

- Krizo kaj demokratio
- Ĉiapo
- Starbucks
- Ruĝnigra kunordigado
- Shell sieĝas Irlandon
- CGT kaj la krizo



Esperantigitaj elĉerpaĵoj el liberecanaj gazetoj

Krizo kaj demokratio

Jurgo Alkasaro

Oni ne celas per tiu ĉi artikoleto analizi la nunan financon krizon, por kies kompreno jam estas produktita sufiĉe da literaturo, kiun aliflante oni supozas konita de la leganto, sed mediti pri iuj mankaĵoj de la sindikata kaj popola kontesto al tiu ĉi krizo.

Mergiĝinta en la krizo kaj batalante pro la nura surviveblo kontraŭ ties teruraj sekvoj, multe aŭ nenion meditas la laboristo, eĉ ne la sindikato, pri la radikoj de la fenomeno kaj pri ties elradikigo. Kredante la amaskomunikilojn, li pensas, ke la krizo estas financa fenomeno kaj eĉ nura trompoŝtelo.

La financa krizo estas krevo el “bobelo” de borsa spekulacia sistemo, fakte tamen ĝi estas nura elmonro de alia pli grava kaj profunda krizo: la krizo de la kapitalisma sistemo. La fakto, kiu plej klare montras la sisteman kaj neripareblan krizon de la kapitalismo, estas ke pli profitodonas spekulacii pri fikciaj valoroj ol investi ĉe la industrio, kio, oni supozas, estas la bazo mem de la sistemo.

La sistemo

Tamen ne. La bazo mem de la sistemo ne estas la industrio sed la kapitalamasigo. Tial la produktado ne celas la satigon de la homaj bezonoj sed la atingon de ekonomiaj profitoj. Elmonro el tio estas, ke, dum grava nombro da bezonoj restas nesatigitaj, oni investas senfinajn riĉaĵojn por krei novajn “pli profitodajn” bezonojn.

La kapitalo bezonas kreski senĉese per kiu ajn rimedo. Oni rigardu tion, kia estas la plej rapida kaj facila maniero akiri reinvesteblajn profitojn (kapitalamasigon) kaj oni vidos la “fartostaton” de la sistemo. Kiam la kielo pliriĉiĝi estas la

starigado de fabrikoj, ni troviĝas antaŭ la “klasika kapitalismo”, la “industriismo”, la kapitalismo kontraŭ kiu batalis niaj anarĥiistaj geavoj. Kiam la kapitalo profitodonas pli investante en la industrio de aliuloj, iĝante uzuristo pri la industrio, ni troviĝas antaŭ la financa kapitalismo, antaŭ la kapitalismo, kiu inventis la tutmondajn militojn –nekontestebla pruvo pri tio, ke la sistemo naskita de la industria revolucio jam ne fartas bone. Kiam la ĉefa rimedo riĉiĝi estas aĉeti kaj vendi fikciajn valorojn, ni troviĝas antaŭ la kapitalismo de la mafioj, de la trompŝtelistoj kaj la blankigo de krima mono, antaŭ sistemo, kie la industriistoj kaj la bankistoj estas anstataŭitaj de la bandaĉuloj kaj la mensogistoj de la amaskomunikiloj. Ni troviĝas antaŭ sistemo, kiu povas oferti nur mizeron kaj detruon al la socio entute.

La ekonomia demokratio

La demokratio, la partopreno de la socio en la decidoprenoj estas laŭdire la bazo de la “okcidenta” socio. Tiu ĉi demokratio havas du kampojn perfekte limigitajn kaj perfekte disigitajn: tiun politikan kaj tiun ekonomian. Dume la tuthoma rajto partopreni la politikan kampon estas agnoskata almenaŭ laŭparole de la sistemo kaj de ties lakeoj (politikistoj, ĵurnalistoj, instruistoj...), iu tuthoma rajto partopreni la ekonomiajn decidojn estas agnoskata **eĉ ne laŭparole** nek de la sistemo nek de ties lakeoj, ĉar la sola ekonomia rajto ekzistanta estas tiu de proprieto.

Tamen ankaŭ estas vero tuthome agnoskita, ke la aŭtentika bazo de la sistemo estas tiu ekonomia kaj ke la aŭtentika povo ne estas tiu politika sed tiu ekonomia, tio estas, eĉ ne la politikistoj kuraĝus nei tion, ke la politika povo estas subordigita al la ekonomia povo.

Nu, la kapitalo estas nenion krom amasigo el profitoj eltiritaj el la ekspluatado de la salajrata laboro, sekve, senbone esti leginta Proudhon-on aŭ Marks-on, sunklaras ke la posedo de kapitalo estas nenio krom ŝtelo al la tuta socio, same kiel estas tia la privatigo de la trinkebla akvo.

Se la estonto de la popoloj kaj de la sistemo mem dependas el la ekonomiko, kiel eblas, ke la popoloj ne postulas sian proprion sur la kapitalo?

Se okazas krizoj kiel la nuna financa krizo, kiu neeviteble trajnos industriajn kaj socian krizon, estas nur ĉar la decidojn reale gravajn por la socio prenas iuj malmultenombraj laŭ siaj propraj interesoj. La ekonomia demokratio, la tuthoma rajto partopreni la ekonomiajn decidojn, estus la sola garantio ne nur por la defendo de la popolrajtoj sed ankaŭ de la pluvivo mem de la homaro.

Tamen neniu, eĉ ne la memnomiĝantaj revoluciuloj, starigas la demandon pri la rajto de la prirabistoj alproprigi la socian riĉecon.

Rolo de la sindikatismo

La rolo de la instituciiginta sindikatismo estas klara por la leganto kaj ne bezonas plian komenton. Sed kiun rolon ludas la revolucia sindikatismo kaj la anarĥisindikatismo? Kiun rolon ludas la socia movado?

La konsento pri la propio de la amasigita socia riĉaĵo (aliigita al kapitalo de la ekspluatistoj) ŝajnas atingi ankaŭ la batalemajn organizaĵojn, kvankam ne laŭ ilia idearo, almenaŭ laŭ ilia publika agado. La timo izoliĝi el la entuto de la klaso kaj de la loĝantaro, se oni pridubigas la privatan proprion pri la amasigita socia riĉaĵo kaj se oni postulas la rajton decidi nian estonton, kondukas la bataleman sindikatismon kontraŭstari nur la sekvojn de la problemo, sed ne ties radikon.

Ne alfronti la krizon radikale, postuli paliativaĵojn (sociajn planojn, subvenciojn, socian salajron, ktp) anstataŭ starigi sunklare la postulon pri la ekonomia demokratio, tio estas, pri la socia propio de la socia riĉeco, estas stimuli la konciencmankon de la jam senkonsciigitaj proletaro kaj ludi rolon, kvankam laŭnombre malsimila, laŭkvalite samvalora ol tiu de la instituciiginta sindikatismo.

La trompoŝtelo estas ne la financa krizo nek la “restarigado de la kapitalismo”, kiun promesas la estroj de la mondo. La trompoŝtelo estas la kapitalismo mem.

La unua homo, kiu, limigante grundon, elpensis diri “tio ĉi estas mia” kaj trovis homojn sufiĉe simplanimajn por kredi lin, estis la vera stariganto de la civila socio. Kiom da krimoj, militoj, murdoj; kiom da mizeroj kaj hororaĵoj estus evitinda al la homaro tiu, kiu faligante la palisaron aŭ plenigante la fosaĵon estus krianta al siaj samuloj: “Gardu vin aŭskulti tiun trompiston, vi estas perditaj, se vi forgesas, ke la fruktoj apartenas al ĉiuj kaj la grundo al neniu!”

Jean-Jacques Rousseau

Deklaracio de la Observa Karavano Solidareca kun Ĉiapo

La gezapatistoj respondadis dum 14 jaroj la demandon: “Ĉu ni povas travivi kaj konstrui la ribelemon je senĉesa milittempo sen aliigi tiun ribelemon al teruro kaj milito?” Dum ĉio tiu tempo ili inventis praktike sian respondon, antaŭenirante sian aŭtonomecon ĉe Ĉiapo, konstruante la alternativon, elsendante al Meksikio kaj al la mondo siajn iniciatojn pri “alia kielo fari politikon”.

Ni, aliĝintoj al la *Zeza Internazional* kaj al la *Alia Kampanjo*, konsistigas tiun naciajn kaj internaciajn karavanon kaj vizitis rezistantajn indiĝenajn komunumojn el 4 el la zapatistaj helikoj: La Realo, Oventik, Morelia kaj La Garrucha. La celo estis observi la politikan, socian kaj ekonomian situacion de la gekamaradoj

kaj montri al ili nian solidarecon.

Ni konstatas la reakiron de la patrinitero kaj ties teritorio, kiu estis subpovo de la bienuloj kaj kiu hodiaŭ apartenas al la prapoloj. La zapatistoj laboras kaj kulturigas la grundon kolektive kaj komunume, kio permesas al ili disvolvi ilian memstarecon laŭ nutraĵa nivelo. Tio aldone ebligas la realigon de iliaj propraj sana, instrua kaj aliaj sistemoj pere de iliaj propraj regoformoj, kie la popolo ordonas kaj la registaro obeas.



Flago de la Zapatista Armeo por la Nacia Liberigo (ZANL - EZLN)

Pri la sansistemo ili klarigas al ni, ke antaŭe mortis infanoj, plenkreskuloj kaj maljunuloj pro kuraceblaj malsanoj. Nun ni trovas sanservojn, hospitalojn, ambulancojn kaj instalaĵojn kun prognoziloj taŭgaj por la kuracaj kaj kirurgiaj servoj. Ili ankaŭ konservas sian praktikon pri herboscienco kaj tradicia kuracado. Gravus rimarki, ke tiu sistemo zorgas sendistinge zapatistojn kaj ne zapatistojn.

Pri la temo de la instruado ni ege surprizis, kiam ni vizitis lernejojn, kie la geinfanoj partoprenas sian propran instruadon, atentas kaj lernas el sia propra historio. Ili rakontis al ni, ke antaŭe la instruado estis trudata, fremda al iliaj bezonoj kaj per unusola lingvo. Nun la instruinstigantoj estas junuloj de la sama komunumo kaj la instrumodelo surbaziĝas sur tio, kio ili bezonas, kaj sur ilia realo ageme kaj dulingve. Gravus ri-



Vi estas en ribelema zapatista teritorio. Tie ĉi ordonas la popolo kaj la registaro obeas.

marki, ke tiu agado –kiel ĉiuj komunumaj– ricevas neniun ekonomian repaĝon.



Infanoj el zapatista komunumo

Ili klarigis ankaŭ, ke, ekde la kreado de la aŭtonomaj ribelemaj zapatistaj municipoj kaj depost la Konsilioj de Bona Regado kun la starigado de la Helikoj antaŭ 5 jaroj, la disvolvo de la aŭtonomeco antaŭeniras neinvertigeble. La rezistantaj indiĝenaj komunumoj disvolvigas la memregadon pere de la sistemo ordoni obeante. La diversaj niveloj de aŭtonoma regado: komunuma, de la MAREZ (Municipoj Aŭtonomaj Ribelemaj Zapatistaj) kaj de la Konsilioj de la Bona Regado, permesas disvolvigi koherre iliajn sistemojn de kolektiva laboro, de instruado, de sano, de nutrado kaj de kion ajn, tuŝanta ilian aŭtonomecon. La membroj estas elektitaj per asembleo (el ĉiuaĝaj viroj kaj virinoj). La postenoj estas honoraj (senpagaj) kaj ĉiumomente senoficigblaj de la asembleo. Aldone ili helpas solvi aferojn, konfliktojn aŭ malfacilaĵojn de kiu ajn, alvokanta la Konsilion de Bona Regado, malgraŭ ke tiu ne estu Eltenanta Bazo, sub la ideo pri ĉio por ĉiuj. La Konsilioj de Bona Regado ebligas la ligilon kun nezapatistaj komunumoj, organizaĵoj aŭ individuoj, respektantaj la procezojn al aŭtonomeco.

Ni observas la partoprenon de la virinoj en ĉiuj kampoj de ilia aŭtonomeco: diversaj postenoj kiel lokaj aŭtoritatoj, municipaj konsilantinoj, membroj de la Konsilioj de Bona Regado kaj kiel instigantinoj pri instruado, sano, ktp. Ili klarigis al ni, ke antaŭ de la Revolucia Leĝo pri Virinoj (1993) la virinoj estis forgesataj, ili havis neniun rajton, ne povis decidi pri la nombro el gefiloj, pri la edziĝaĝo, pri kun kiu ili estis edziĝontaj kaj ili havis ankaŭ nenian eniron al la instruado aŭ al la sansistemo. Nun estas eĉ kliniko pri reproduktada sano, kooperativoj, ili atingis tiel liberecon ne nur laŭ parole sed ankaŭ laŭfakte, ĉar ili povas organizi per si mem sen bezono peti permeson al neniu.

Kio ebligis tiun ĉi daŭrigan realon estis sendube la ĉiutaga digno kaj rezistado de la zapatistaj viroj kaj virinoj kune kun la solidareco. La ega forto de tiuj ĉi digno, rezistado kaj solidareco atingis la



Subkomandanto Marko

konstruadon de la vivo anstataŭ tiun de la morto kaj la paceman rebelemon anstataŭ la militon, kiun ekde ĉiam klopodas altrudi la alianco de la meksikia politika kaj ekonomia povo. Kaj tiu ĉi sama zapatista kaj solidareca forto ebligis la konstruadon de espero pri alternativo je la manieroj kaj paroloj de la movadoj kaj rezistadoj de la planedo Tero, kiu ankaŭ suferas la barbarecon de la kapitalismo kaj ties novliberala modelo. Sed la minaco daŭre latentas, tial ni kunuzu pluvoje la solidarecon kiel komunan spacon kaj vojon per la defendo de la ribelema digno, vivanta kaj rezistanta ĉe la montaro de la sudorienta Meksikio kaj kiu nutras ankaŭ niajn luktojn, esperojn, formojn kaj praktikojn por atingi alian novan, pli bonan kaj eblan mondon.

Eviti la katastrofon kaj ne permesi al la meksika registaro altrudi ties mortoplanojn, estas ankaŭ ĉe niaj manoj. Nepras agi nun! La solidareco estas nia armilo. Nepras renovigi ĝian forton kaj imagokapablon. Nepras sciigi la zapatisojn mem, la socion, la mondon kaj la registarojn, ke la zapatismo daŭre estas

inspiro, espero, vivo kaj solidareco.

Deklaracio

Ni, gealiĝintoj al la *Zeza Internacia* kaj al la *Alia Kampanjo* subtenas la aŭtonomiĝan procezon de la zapatistaj komunumoj kaj agnoskas nin ĉe tiu alia modo fari politikon –desube kaj maldokstren.

Kvankam ni ne restos ĉi tie, ni reasertas, ke la zapatistoj ne estas solaj kaj ke ni kompromisas daŭrigi la batalon por konstrui alian mondon, kiu enhanceblu aliajn mondojn.

Ni daŭrigos nian energian denoncon de la tri niveloj de regado pro ajna atako, aresto, minaco, provokado per kiuj ili klopodas finigi la aŭtonomiĝan procezon de la zapatistaj komunumoj.

Ni ankaŭ postulas la senmilitistigon kaj la ĉesigon de la agado de la kvazaŭmilitistaro ĉe la zapatista teritorio. Ni klare komprenas, ke la atakojn kontraŭ la prapopoloj okazigas la kapitalismaj politikoj, leĝoj kaj programoj, kiujn ni repuŝas. Ni postulas tujan liberigon de la politikaj prizonuloj.

Starbucks

ĉe ni kiel ĉe Usono respektas neniun gelaboristan rajton

Starbucks esta iu el la ĉefaj kafoprovizantoj kaj -rostantoj en la mondo, ĝi havas pli ol 13.000 instalaĵojn ĉe 35 landoj. Malgraŭ ĝia bildo pri marko engaĝiĝinta en la justa komerco kaj la eltenado de la medio, la ĉeno el kafejoj malhelpas la sindikatajn liberojn ĉe siaj vendejoj kaj trouzas la kafoproduktantojn

Ĉe Hispanio estas ĉirkaŭ 43 el tiuj. Per tiu kampanjo oni celas diskonigi la malpli afablan flankon de tiu ĉi kafejĉeno, ĉar post ĝi estas ekonomiaj interesoj, humiligantaj tiel la homojn, kiuj produktas kafon, kiel tiujn, laborantaj ĉe ĝiaj instalaĵoj. La situacio de

la laboristoj “malsimilas per nenio el aliaj tiuspecaj franĉizoj: provizora dungeco, ega prilabora sendefendo kaj multaj malfacilaĵoj al la sindikatiĝo”.

Ĉe tio labora tiu ĉeno distingiĝas per subpremanta politiko ĉe la kampo de la

sindikataj liberoj. Ekde la 2004a sindikatanoj de IWW (Industrial Workers of the World - Tutmondaj Industriaj Laboristoj) realigas kampanjojn por defendi la rajtojn de la gelaboristoj. Iliaj postuloj estas bazaj: indaj salajroj, stabilaj deĵordaŭron kaj sana asekuro.

La respondo de Starbucks estis la timigo por eviti ilian aliĝon al IWW kaj eĉ maldungi plurajn kamaradojn. Post atingi pakton pri laboraj plendoj kontraŭ ĝi, *Starbucks Coffee Co.* denove estas objekto el plendo antaŭ la Nacia Konsilio pri Laboraj Rilatoj kaŭze de la maldungo de Daniel Gross kaj Joe Agins, agitistoj de la Sindikato de Laboristoj ĉe Starbucks (parto de IWW). La 12an de junio de la 2007a ĉe la Labora Konsilio de Manhattan malfermiĝas alia proceso kontraŭ Starbucks kaŭze de malplenumo de laboraj rajtoj ĉe kvar kafetejoj, tuŝanta pli ol dek gekamaradoj.

Starbuks kaj la protestoj pro la etiopa kafo: Dum jaroj Starbucks ofertis la kafojn *Sidamo*, *Yirgacheffe* kaj *Harar*, la plej bonajn etiopajn kafojn kaj pro kiuj

la kampanoj ricevas apenaŭ pagon. Por mildigi tion, la etiopia registaro ekigis projekton, per kiu atingi laŭleĝan proprieton pri la kvalitaj nomiĝoj, kio povus okazigi plibonigon por la kultivistoj.

Sed Starbucks starigis proteston por ke la pripatenta agentejo de Usono ne akceptu ĝin. Post monatoj el protestoj Starbucks kaj la etiopia registaro atingis paktoinicion. Iuj neregistaraj organizaĵoj (NRO) sin gratulis. Aliaj rimarkas, ke Starbucks nur agnoskis, ke “la etiopia kafo estas etiopia kafo”, sed ĝi daŭrigas iligante la justan komercon kiel propagandilon por laviĝi siajn manojn, kiel ĉe aliaj plurnaciaj entreprenoj la milionaj profitoj apenaŭ atingas la laboristojn. Kiel rimarkis Naomi Klein en *No Logo* ĉe Starbucks okazis salajra malpliigo “dum periodo, kiam la ĉeno duobligis siajn negocojn kaj malfermis 350 novajn vendejojn jare”. Ĉio tio, ili diras, malgraŭ ke je ĝia “komisio” Starbucks agnoskas ĉefcelon “montri kiom danke-maj ni estas kaj kiom ni valorigas kaj respektas ilin”.



Ruĝnigra Kunordigado

Ángel Bosqued

La kunveno ĉe Ateno disvolviĝis tre pozitive dum la semajnfino de la 24a al la 26a de oktobro kaj kontentigis ĉiujn partoprenantojn

Ni reprezentantoj de la USI (Italio), IP (Polonio), CNT (Francio), IWW (Anglio) kaj CGT (Hispanio) interparolis intense sub la organizo de la grekaj kamaradoj de ESE. Ekskuzis sian foreston la SAC (Svedio).



La CGT-a propono komenci grandan unuĝantan mobilizon kontraŭ la EU-aj politikoj ricevis bonan akcepton kaj, kvankam ankoraŭ man-

kas konkretigi la precizan laŭlandan disvolvon, ekde nun ni eklaboras por serĉi la plej taŭgan kielon sukcesigi tiun mobilizon.



Oni ankaŭ preparolis la perfektigon de la nomo de la Kunordigado, ĉar estas signifa malfacilaĵo pri iuj vortoj ĉe la diversaj lingvoj: ruĝa kaj nigra signifas anarĥiismon en Grekio kaj

anarĥisindikatismon en Italio, sed en Svedio tio signifas tute alian aferon; sindikato aŭ sindikata je la angla memorigas la mafion kaj la mastraron... Pri tiu afero ni bezonos multan imagokapablon kaj lertecon.



Ni decidis apogagadon kun la svedaj kamaradoj, kiuj estis subpremataj kaŭze de la bojkoto al japana restoracio en Malmöe, kaj kun pola kamarado, punita sub akuzo kaŭzi perdojn al entrepreno.

Ĉe la punkto pri novaj aliĝoj oni priparolis la okazon de la FAU (Germanio), kun kiu interparolis la CNT-f kaj kiu manifestis la neblon aliĝi al la Kunordigado, ĉar la interkonsentoj de la ILA (Internacia Laborista Asocio) malebligas kunagi kun SAC kaj CGT. Ĉe la okazo de Laborista Solidareco la CGT manifestis la neeston de malfacilaĵoj kaj tial nur restas, ke LS respondu la invitolon de la Kunordigado kaj diru kiam kaj kiel ili volas kunlabori.



SAC-Syndikalisterna
En fri kâmpande fackförening

Dum la sama semajnfino ESE organizis dumvesperajn prelegojn (de 19:00 ĝis 24:00). La vendredo okazis la prezento de alilandaj organizaĵoj, kunvenintaj tiun semajnofinon. Je la sabato komencis prelego pri la malstabileco, kiu estis daŭrigita je la dimanĉo. La ĉeesto estis de pli ol cent personoj (ĝi okazis ĉe la Granda Salono – Aula Magna– de la Plurteknika Universitato) kaj estis interesoplejaj diskutoj kaj ĉefe la ĉeesto de novaj homoj, kiuj komencas vidi referencilon ĉe la sindikata laboro, kiun realigas diversaj anarĥiistaj grupoj, inter kiuj elstaras la organizaĵo ESE.



Krom ŝanĝoj la proksima kunveno okazos je junio ĉe Parizo.

La kontraŭkriza plano de Bush: grava trompoŝtelo al la homaro

Enric Duran

La registaro de Usono asertas, ke ĝi elspezos 700.000 milionojn da dolaroj por *savi* sialandan finanĉan sistemon. Tion asertas la prezidanto el lando kun ekstera ŝuldo de 9.600.000 milionoj da dolaroj. Tiu mono sekve pli-grandigos la usonan ŝuldon per 7% kaj ĝi estos kreata el nenio de la usona federacia rezervo.

Ĝi estos iu el la pli inflaciigaj operacioj el la tuta historio, ĉar oni kreas multegan monon sen neniu produkta kreskado ligita al konsumado de aĵoj kaj servoj, praviganta ĝin.

Ĉar la dolaro estas ankoraŭ la ĉefa monero de la tutmonda rezervo, Usono ne repagos tiun ĉi ŝuldon. Kiu repagos ĝin do?

Tiu ĉi kontraŭkriza plano senvalorigos ankoraŭ pli la dolaron kaj sekve la planon pagos unuflanke la civitanoj el landoj kun monero ligita al la dolaro, kiuj vidos kiel ĝi daŭre senvaloriĝas.

Aliflanke pagos ĝin la ŝtatoj kun gravaj rezervoj el dolaroj kiel Ĉinio, Koreio kaj multaj el la petroleksportantaj landoj, sekve la popoloj el tiuj landoj.

Sekve Bush denove profitas la hege-

monian situon de sia mono kaj sia lando por antaŭenirigi planon, per kiu oni financos la ŝuldojn de privataj entreprenoj surkoste de grava parto el la monda civitanaro. Alivorte, oni klopodas savi la finanĉan ekonomion koste de plendamaĝi

la produktantan ekonomion. Kaj tio, per vortoj kompreneblaj de ajnulo, signifas, ke la kostoj aĉeti manĝaĵojn, prienergiajn servojn aŭ loĝejojn – ekzemple – pliigos sen tio, ke pliigos la sa-

lajroj, por ke la financaj entreprenoj povu elteni siajn profitojn kaj sian privilegian situacion ĉe la mondo.

Kion oni devus fari anstataŭ tio? La solvoj bezonas reformuli plene la internacian finanĉan sistemon, tiel ke la kreado de mono ne estu plu ĉemane de privataj sed ĉe publikaj manoj, kiel parto de transformiga plano, kiu metos la ekonomion sub la politiko kaj ne tute male kiel nuntempe.

Tiel do, kiel mi titoligis tiun ĉi etan artikolon, tiu ĉi kontraŭkriza plano, parto de la usona ŝuldo, estas la pli grava trompoŝtelo al la homaro.



Financo kolapsis, ĉu nenio restos same?

Isidro López

Maloŭte okazas je tiom malmulta tempo lavango el sinsekvaj bankrotoj kaj minacoj de bankrotoj el la plej gravaj financaj entreprenoj, sekvata de ega ŝtata interveno, sed ĉu ni travivas realan ŝanĝon?

Dum la lastaj semajnoj la katastrokto el okazaĵoj prenis kontentan aspekton (kiun ne plaĉas, ke iu investa banko iru al inferon?) kaj tragedian fonon (ĉiu enmeto el publika mono implicas pliajn malfacilaĵojn por tiuj, kiuj malpli havas). Sed pluen de la sensacoj nepras rigardi la efektojn el tiuj ĉi mezuroj.

La preno de la ŝtato

La evidenta ekcepteco de tiuj ĉi mezuroj estis ampleksigata de multaj grandparolaj interpretoj, ĉu dekstre kaj maldekstre, kiuj konsideras finiĝinta epokon de neinterveno de la ŝtatoj ĉe la ekonomiaj procezoj. Plejparte tiuj ĉi “gravegaj” interpretoj, pli ol klarigi tion, kio konsistigas la historian gravecon de la momento, transdonas sensacon el surprizo, kiam ili eltrovas, ke la mondo ne estas tiel, kiel asertis la novliberala retoriko.

Fakte, kio sunklariĝis dum tiuj semajnoj, estas tio, ke la financaj merkatoj produktas nur fikcian riĉaĵon, kiu malaperas samrapide kiel estas kreita, kaj ke la ŝtatoj estas ĉeferoj por ke la financaj merkatoj regu la ekonomian agadon kaj pere de ĝi la socian vivon. La fakto, ke

tiu procezo videbliĝis agonie kaj senproporcie, ne aliigas ĝin al historia disrompo.


Kiel klarigadis la ekonomia historiisto Robert Brenner, tio grava por la novliberala epoko de la 90-aj ne estis la neinterveno de la ŝtato en la merkatoj, sed ke la politikoj de la ŝtatoj estis subserve de la bezonoj de la financa kapitalo. La decida engaĝo de la sinsekvaj hispanaj registaroj al la polikoj, celantaj ŝveligi ĝis

tio nepensebla la nemo-veblaĵan bobelon, multokaze per rektaj subvencioj, situigis la hispanan ŝtaton ĉekape de tiu procezo kune kun Usono kaj Anglio.

Tiu ĉi submetiĝo de la ŝtato al la interesoj de la financa sektoro plifirmiĝis surbaze de interŝanĝo, kiu nun malkaŝiĝas per ĉiu sia frenezeco: la ŝtato garantias profitojn al la financa sektoro senreguligante iun kampojn kaj tre strikte reguligante

aliajn kaj stimiligante ĉiam plian ampleksigon de la financoj sur la socia korpo pere de privilegiaj financaj iloj, kiel pensiaj fondusoj aŭ hipotekoj.

Kiel kompensilon la financaj institucioj uzis la magian bastoneton de siaj kompleksegaĵaj produktoj por aliigi la per-



sonan kaj familian ŝuldon al riĉaĵo kaj – pli grave ankoraŭ – al plia demando, motora forto de la ekonomia kreskado, kiun ege senvalorigitaj salajroj ne povas elteni eĉ reve. Tiu interŝanĝo produktis fortan kreskadon mallongatempe kaj ampleksan socian konsenton pri la taŭgeco de tiuj politikoj, kiun kontestis nur tiuj, komprenantaj la egajn ekonomiajn, sociajn kaj ekologiajn kostojn.

La fino de la miraĝo

Nun ni rigardas la rapidegan transformon de la fikcia riĉaĵo, kiun generas la financaj aktivoj, al tre realaj ŝuldoj. La ŝtataj institucioj intervenas ĉe tiu situacio pere de disdono, per kiu la plejmulto de la socio prenas tiun ŝuldon, ĉu rekte per pliigita interesotipo aŭ malrekte per la publika elspezo, bezona por elteni la financon sistemon aŭ –okaze de Hispa-

nio– la senmoveblajn sektoron. La alia flanko de la afero estas la rapidigo de la transpaso el reala riĉaĵo, la socia produkto, al la financaj merkatoj, por ke la profitoj kaj rentoj de la kapitalo ne spertu gravajn faliĝojn. Tio estas, kiel lerte antaŭvidis la ekonomikisto George Dumenil, tio identigita kun la novliberalismo (privatigoj, senreguligoj, salajra kontrolo, ktp) ne estas kohera aro el ekonomiaj praktikoj, sed politika ordo, kiu uzas per rimarkinda efikeco ekonomian politikon subordigitan al sovaĝa klasregado. Laŭ tio ĝis nun vidita la lastaj intervenoj, kvankam subfosas videble iujn novliberalajn dogmojn, plifortigas pli ol febligas tiun submetiĝon de la plejmulto el la socio sub la povo de la financa sistemo kaj de la malplimultecaj sociaj klasoj, kontrolantaj ĝin.

Shell sieĝas la okcidentan marbordon de Irlando

Gabriel Villanueva

Ĉe la graflando Mayo la situacio estas ĉiam pli kaj pli streĉa. La planoj de la plurnacia petrola entrepreno Shell daŭre antaŭeniras, malgraŭ la kontraŭstaro de la loĝantaro.

La okazo ekas je la 1996a, kiam oni eltrovis naturan gason ĉe kamparana regiono de Mayo apud la okcidenta marbordo de Irlando. Tuj pluraj entreprenoj komencis barakti pro la ekspluatmonopolon kaj la plurnacia Shell sukcesis. Tuj poste tiu petrolentrepreno kaj la registaro

interkonsentis la konstruadon de gasdukton, kiu transportos la gason ĝis es-tonta rafinejo apud la vilaĝo Bellanaboy tra Rossport kaj Erris.



La jaron 2000-an ekis la unuaj protestoj. La loĝantaroj de la regiono komencis kunveni ĝenitaj de la absoluta informomanko flanke de la administracio. Ili asertas, ke nenie ĉe la tuta mondo estas tiaspeca rafinejo tiom apuda al loĝita loko.

La afero atingis la tribunalojn dum la

2002-a kaj tiuj verediktis favore al la loĝantaro de Mayo per la argumento, ke Shell ne elektis taŭge la lokalizon de la rafinejo nek tiun de la gasdukto kaj devigis la entreprenon modifi ties planojn. Malgraŭ tio la Ministro pri Maraferoj kaj Naturaj Rimedoj asertis, ke tiu tribunala decido estis nur “simpla kontraŭaĵo”.

La jaron 2003-an la tiama ĉefministro Bertie Ahern –nun priesplorita kaŭze de lia supoza partopreno en priurboplanaj koruptaĵoj dum sia regado– kunvenis persone kun la kompetentaj juĝistoj kaj altnivelaj gvidantoj de Shell. Nur unu semajno post tio, la tribunalo modifis sian decidon kaj donis la permesojn al Shell.



Shell ĉemaren

La registaro informis la proprietulojn de la regiono pri tio, ke la gasdukto trapasos iliajn grundojn vole nevole. Iujn proprietulojn akceptis, sed 34 el ili plenrifuzis doni la koncernajn permesojn al Shell. Tiutempe oni iniciatis la kampanjon “Shell to sea” per vortludo je la angla. La kampanjo havas du ĉefajn celojn, unue denonci la privatigon de la naturaj rimedoj en Irlando, elmontrante la malrespektoman kaj aŭtoritateman sintenon tiel de la registaro kiel de la plurnacia entrepreno. Due klopodi atingi ŝanĝon de la lokiĝoj de la gasdukto kaj la rafinejo, engaĝiĝante en alternativa lokiĝo ĉemare for de la loĝataj areoj, pro tio la nomo de la kampanjo.

Tamen la konstruaĵoj komencis en tiuj terenoj, kie la proprietuloj donis permesojn.



son. La streĉeco plialtiĝis senĉese ĝis la 2005-a, kiam la laboristoj de Shell klopodis eniri senpermeso la terenojn, kie la proprietuloj ne signis la interkonsenton. Antaŭ la repuŝo de la loĝantoj Shell denoncis la 34 proprietulojn, kiuj malebligis la eniron de la maŝinoj.

Enprizonigo de kvin najbaroj

La 29-an de junio de la 2005-a kvin proprietuloj de Rosspport estis kondamnitaj al nedifinaj prizonpunoj. Tio, anstataŭ malfortigi la protestmovadon, reĉis ĝin ĉe la tuta Irlando. La solidaragado disvastiĝis rapide tra la lando kaj multnombraj benzinejoj de Statoil –irlanda Shellfilio– estis bojkotataj. Tiel, samtempe kun la organizado de apogkampanjo por la kvin de Rosspport multnombraj homoj alvenintaj el ĉie tendumis sur iliaj terenoj, por ke la maŝinoj en eniru tien dum la malĉeesto de la proprietuloj. Dum du monatoj la polica ĉeesto senĉesis kaj okazis iuj alfrontiĝoj. Dumaŭguste Shell ordonis hal-





tigi la konstruon kaŭze de la senĉesa premo de la pikedoj kaj anoncis “trankvilan periodon”. La 30-an de setembro post intensa kontraŭsubprema kampanjo la kvin de Rossport estis liberigataj.

Tamen je setembro de la 2006-a la plurnacia entrepreno anoncis sian volon daŭrigi la laborojn kaj la loĝantaro reorganizis. La 16-an tagon revenis la maŝinoj, kiujn denove haltigis la pikedoj. Fine la 3-an de oktobro pli ol ducent policianoj elvenintaj el ĉiuj landeroj atingis,



ke la maŝinoj eniras la proprietajn.

Ekde tiam la projekto antaŭeniras, sed samtempe la protestoj, la sabotadoj kaj la policianaj atakoj konsistigas novan rutinon ĉe la regiono.

La loĝantaro ne submetiĝas

Hodiaŭ la kampara loko havas korŝiran aspekton. La konstruaĵoj, la trafositaj terenoj, la peza maŝinaro, la bariloj, la imponaj sekurmezuroj estas la ĉefproblemoj. La registaro siaflanke pliampleksigas la ŝoseon ĝis la loko por plifaciligi la operaciojn al Shell. Komence de setembro de la 2008-a per senprecedenta manovro militŝipo de la Irlanda Ŝiparo estis sendata por protekti boaton de la entrepreno, kiu estis bojkotata de fiŝistoj kaj improvizaj pirogantoj. Tiu ĉi estas la unua fojo ĉe la historio de la Irlanda Respubliko, kiam la armeo atakas la civilan loĝantaron. Antaŭ tiu sieĝstato lernantino kaj najbarino de la regiono, Maura Harrington, komencis malsatstrikon je la 10a de setembro. Post 11 tagoj, kiam la ŝipoj de la armeo kaj de Shell formarŝis, Harrington finis la proteston. Tamen antaŭ tio ŝi anoncis la daŭrigon de la rezistado ĉe la graflando de Mayo.





CONFEDERACIÓN GENERAL DEL TRABAJO Secretariado Permanente

C/ Sagunto, 15, 1º 28010 MADRID
TL. 91 447 57 69 - FAX 91 445 31 32

spccc.cgt@cgt.es

www.cgt.es

www.rojoynegro.info

La ĜKL-CGT antaŭ la laboro, la sendungado, la financa, ekonomia kaj politika krizo postulas de la publikaj institucioj kaj organismoj, ke oni ĉesu trompoŝteli kaj mensogi la socian plejmulton, la enmigrintajn kaj aŭtonomajn gelaboristojn, la gepensiulojn, la gejunulojn kaj ke oni finigu politika-socian modelon, kiu surbazu sur la elĉerpo de la naturaj rimedoj kaj kiu igas ĉiam pli senelira la vivon ĉe la planedo.

La 24an de oktobro la enketo pri aktiva loĝantaro (EAL) denove montras al ni la socian kaj ĉiutagan realon de la loĝantaro kun pli ol 16 jaroj kaj povanta labori: 38.270.700 homoj.

- El la homoj taksitaj kiel aktivaj laboras 20.346.300 kaj ne laboras, alivorte estas senlaboruloj, 2.598.800
- El la homoj taksitaj kiel ne aktivaj ĉirkaŭ 8.700.000 estas gepensiuloj, kies averaĝaj enspezoj dum la lasta jarkvarono atingis 806 € monate
- La salajruloj estas 16.746.200, el kiuj 11.000.000 ricevas monatan salajron el 980 €
- Ĉe la alia pinto estas eta malplimulto el privilegiuloj, kiuj estas membroj de administraj konsilantaroj, entreprenaj stabanoj, gvidantoj, altkvalifaj teknikuloj, kiuj ricevas salajrojn/rentojn el ĉirkaŭ 450.000 € monate
- La 2.598.800 senlaboruloj enspezas subvenciojn pri sendungeco el malpli ol 800 € monate
- Tiuj, kiuj estis forpelataj el siaj laborpostenoj dum la lasta kvarono de la 2008a estas 217.000 kaj tiuj, perdintaj sian laborpostenon dum la lastaj dekdu monatoj estas 806.900

La maldungo kaj sia sekvo la senlaboreco plialtiĝis ĉe ĉiuj sektoroj dum la lasta jarkvarono: la konstruado perdas 57.600 postenojn kaj la tieaj senlaboruloj kalkulas 354.000 dum la lastaj 12 monatoj. La servoj pliigas la senlaborecon je 47.700 personoj, la industrio je 27.200 kaj la agrokulturo je 26.900.

La sendungaj homoj dum pli ol unu jaro estas 609.500 kaj la nombro de hejmoj kun ĉiuj ties aktivaj membroj sendunge kreskis dun la lastaj 12 monatoj ĝis 258.800 personoj.

La dek grandaj bankaj entreprenoj, 8 bankoj kaj 2 ŝparkasoj, atingis netan profiton el 100.000 milionoj da € ekde la 2000a ĝis la 2007a. La hispana parlamento aprobis financi la financbankan sistemon per 50.000 milionoj da €, amplekseblaj ĝis 100.000 milionoj, por “redoni memfidon al la merkato kaj ke ili havu monon por financi la realan ekonomion”.

La ĜKL ne nur repuŝas tiun gravan socian trompoŝtelon, kiu estas aprobita de la parlamento, sed ankaŭ denoncas kaj kontraŭstaras per la forto de la racio kaj de la socia justo tion, ke oni financu la privatan profiton de tiu ĉi eta socia malplimulto, ricevanta averaĝan popersonan enspezon el 450.000 € monate.

Tiuj 100.000 milionoj *donacitaj* al la financa sistemo eliras el la publika kaso kaj nek la laborulojn, nek la pensiulojn, senlaborulojn, junulojn oni demandis pri tiu ĉi decido.

La 100.000 milionoj oni devas uzi por garantii sufiĉan renton al la 2.600.000 nunaj senlaboruloj, dediĉi ilin plialtigi la pensiojn kaj enspruĉigi ilin por finigi la relativan malriĉecon, kiun suferas ĉirkaŭ el 9.000.000 da personoj je la hispana ŝtato.

Ni devas agi kaj ribeli ĝis reiri al situacio, kie la sociaj kaj laboraj rajtoj de la homoj kaj la respekto al la naturo kaj la tero estu garantiitaj kaj bona socia vivo estu ebla por ĉiuj.

La ekonomiaj kaj publikaj povoj devas garantii sufiĉajn rentojn kaj postuli respondecajn de tiuj, kiuj malrajte alpropigas kaj ne kontribuas al la ĝenerala intereso. Ili devas postuli, ke iliaj salajroj kaj rentoj estu limigitaj, ke iliaj impostoj estu pli grandaj kaj ke ili alportu siajn privatajn profitojn al ekonomio eltenebla kaj ebla por la socio entute.

La ĜKL ne nur kontraŭstaras la spekulaciistojn kaj ties altegajn profitojn, sed ĝi postulas radikan socian ŝanĝon kontraŭ la “senindulgaj leĝoj de la kapitalista merkato”, tio estas la laŭlegigo de iliaj maĥinacioj kaj friponaĵoj por modifi la prezon de la aĵoj (loĝejoj, nutraĵoj, krudaĵoj, ktp) kaj de ilia antaŭmeto de la privataj profitoj antaŭ la vivo kaj ties bezonoj.

**La laboristoj, salajruloj kaj mezaj klasoj devas postuli de la ekonomiaj povoj, la ŝtatoj kaj ties organismoj pri kontrolo de la publika mono (Centraj Bankoj, Federa-
ciaj Rezervoj) la disdonadon de la riĉaĵoj kaj la rimedoj inter tiuj, kiuj ja alportas nian laboron kaj estonton al la elteneblo de la publika trezoro kaj por ke niaj sociaj bezonoj estu kovritaj per kriterioj el sufiĉeco, solidareca disdono kaj justeco.**

La tekstoj

- ALKASARO, Jurgo: «Krizo kaj demokratio», 2008 
- «Pronunciament de la Caravana d'Observació i Solidaritat amb Chiapas», *Catalunya* 2008(101)17. <http://www.revistacatalunya.cat> 
- «Starbucks: Aquí, como en EEUU, no respeta los derechos de los trabajadores», *Rojo y Negro* 2008. <http://www.rojoynegro.info> 
- «Consolidación de ESE y avances en la Coordinadora Roja y Negra», *Rojo y Negro* 2008. <http://www.rojoynegro.info> 
- DURAN, Enric: «El pla anticrisi de Bush, una gran estafa per la humanitat», *La Directa* 2008(109)7. <http://www.setmanaridirecta.info> 
- LÓPEZ, Isidro: «Llegó el colapso financiero, ¿ya nada será igual?», *Diagonal* 2008(86)32. <http://www.diagonalperiodico.net>
- VILLANUEVA, Gabriel: «Shell assetja la costa oest d'Irlanda», *La Directa* 2008(109)19. <http://www.setmanaridirecta.info> 
- «La CGT ante el trabajo, el paro, la crisis» <http://www.cgt.org.es/>

Esperantigis Jurgo Alkasaro



Vi rajtas:

- **dividi** – kopii, distribui kaj transdoni la verkon
- **remiksi** -- adapti la verkon

Laŭ jenaj kondiĉoj:

- **Atribuo.** Vi devas atribui la verkon tiel kiel specifis la aŭtoro aŭ la permesil-posedanto (sed ne en maniero kiu implicas ke ili subtenas vin aŭ vian verkon).
- **Nekomerca.** Vi ne rajtas uzi tiun ĉi verkon por komercaj celoj.
- **Distribui kun sama permesilo.** Se vi ŝanĝas, adaptas, aŭ faras ion, kio baziĝas sur tiu ĉi verko, vi rajtas distribui la rezultan verkon nur kun permesilo identa aŭ simila al tiu ĉi.
- Por iu ajn reuzo aŭ distribuo, vi devas klarigi al aliaj la permesilon de tiu ĉi verko.
- Ajna el tiuj ĉi kondiĉoj povas esti nuligita se vi ekhavas permeson de la kopirajto-posedanto.
- Nenio en tiu ĉi permesilo endanĝerigu aŭ limigu la moralajn rajtojn de la aŭtoro.